

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
134
aŭtuno 2023



leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

federacia retejo
<http://www.esperanto-provence.org>

prezidanto
Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkotoz (kun la gazeto): 6 €
> ĉeko al: Espéranto-Provence
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de P. Oliva)
> aŭ bankĝiro
(bankinformoj ĉe la sekretario)

sekretario kaj redaktoro
Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**
10-a de decembro 2023
bonvolu sendi al la supra retadreso
><><
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

Vorto de la redaktoro

Vi ĵus surekranigis aŭ enmanigis al vi la duan numeron de nia novformata gazeto. Ĉu plaĉas al vi la pli etaj paĝoj? Ĉu la formato ebligas al vi kunporti la gazeton en via sako por legi ĝin ie ajn, laŭplaĉe? Mi ne havis multe da priaj komentoj, sed fidante la Zamenhofan proverbon: «Silento estas konsento», mi definitive adoptas la formaton A5, kiu ankaŭ al mi multe pli plaĉas.

Post alvoko mia al sendo de raportoj pri la Torina Universala Kongreso, mi surprize ricevis multe da tekstoj kaj fotoj. Jen do speciala numero ĉi-tema. Agrablan legadon!

S
P
E
C
I
A
L
A



N
U
M
E
R
O

enhavo

2	> el la provencaj asocioj	9 ĝis 19	> speciala dosiero pri la Torina UK
5	> vojaĝemaj federaciaĵoj...	20	> INK
7	> ... kaj vojaĝemaj eksterlandaj samideanoj	23	> nekrologo > agendo

El la provencaj asocioj

Kiel kutime okazis finsomere pluraj forumoj de asocioj, en kiuj partoprenis la Eokluboj de nia federacio. Jen kelkaj ricevitaj raportoj.

Pri la forumoj en La Ciotat kaj Marseille

Kelkaj preterpasantoj (ĉu 20 %?) neniam aŭdis la vorton aŭ konas la ekziston de Esperanto; preskaŭ neniu diras, ke la angla estas la internacia; multaj konkludas, ke estus bone se la infanoj lernus ĝin en la lernejo (en La Ciotat, kiam la nova urbestro vizitis nian budon, mi ŝovis ke ni "ŝatus interveni en la bazaj lernejoj" sed li longe komentis «La etan Princon»)

Kelkaj surprizoj: 8-jara knabo estas kaptita ne de bildstrio pri Tinĉjo sed de la titolo "Brassens" ĉar li konas liajn kanzonojn! Luj en La Ciotat revenas, memorante tion, kion ni diris al ili pasintjare! Multaj miras, ke ni jam disponigas kalendarojn por 2024!

Malsimile al la antaŭaj forumoj, kie



evidentiĝas, ke ni neniam havas la ĝustan libron ĉe-mane, ni surtabligis nur kelkajn librojn sed lasis ilin en kesto, tiel, ke ni facile povis eltiri la ĝustan laŭ la intereso de la vizitanto. En Marseille ni povis alparoli la homojn en la angla, rusa kaj pola!

raportis R. Triolle



raportis T. Spanjaard

L'édition 2023 de VIVACITÉ, le festival des associations marseillaises, s'est déroulée le dimanche 3 septembre 2023 de 10h à 18h30 sur le Vieux-Port, avec plus de 500 associations annoncées.

Espéranto-Marseille était bien sûr présente avec son stand où ont été reçues toutes les personnes intéressées par la découverte de l'espéranto. L'association en a profité pour annoncer son programme pour l'année 2023-2024 : cours, conférences, rencontres, etc.

Forumo en Saint-Raphaël

Sabaton la 2-an de septembro okazis la Forumo de la asocioj en Saint-Raphaël. Mi tre ŝatas ĝin! Por partopreni en ĝi, mi revenis el Hispanio, kie mi ankoraŭ havis laboron. Eble mi tien reiros baldaŭ. Tamen mi ne bedaŭras, ĉar la forumo de la asocioj estas laŭ mi grava... kaj tre agrabla.

Ĝi disvolviĝis en inda loko, «Les Jardins Bonaparte», de kie oni povas vidi la maron, la foran horizonton, la havenon kaj la urbon. Ĉion tion ni vidis de nia budo.

Ĉiuj budoj estis tre taŭge ŝirmitaj de belaj blankaj tendoj. La loko estis preskaŭ «moŝta»!



La novalvenintoj en Saint-Raphaël estis bonvenigitaj per aperitivo bongusta kaj abunda. La urbestro diris kelkajn vortojn kaj vizitis la budojn.

Mi ne scias, ĉu ni havos novajn Esperanto-komencantojn, tamen ni diskonigis nian lingvon! Mi allogis homojn danke al mia panelo-vesto. Esperanton mi ekinstruis per la dialogoeto broditita sur ĝi. («Bonan tagon! Kiel vi fartas? Bonege!»)

Monique kaj Pierrot Prezioso ne estis en Saint-Raphaël, sed venis helpi nia fidela amikino Simone, kiu eĉ adiaŭis per «Ĝis!» Venis ankaŭ Nicole kaj Gilles Wallez, el Draguignan, kiuj bone helpis kaj parolis pri la Universala Kongreso en Torino.

Mi pendigis tabulon kun grande videbla ĜIS skribita por helpi.

Do, ĉio disvolviĝis glate kaj agrable. Mi allogis infanojn rakontante la naskiĝon de Esperanto.

Simone kaj Nicole multe helpis skribante niajn telefonnumerojn kaj «Ĝis» sur la disdonataj kalendaretoj, por ke la homoj ne forgesu. La ricevintoj promesis ne ĵeti ilin kaj eventuale doni al aliuloj.

Jen kiel disvolviĝis la Tago de la asocioj en Saint-Raphaël... ĝis!

raportis C. Segarra



"Se ni ne rakontas ke Esperanto ekzistas, ĝi vere ne plu ekzistos. La estonto de nia bela kaj efika internacia lingvo dependas de ĉiu esperantisto. Pro tio ni devas ĝin diskonigi multe pli..."

Neniu dubas, ke Carmen delonge proprigis al si la ĉi-supran sentencon...



Renée Triolle



kelkaj el la lernolibroj
de Renée Triolle

Tuj post la forumo de asocioj, en La Ciotat en la korto de la plej malnova kinejo de la mondo, «Eden-Théâtre», verkistoj estis invititaj al Salono.

Prezentis sian duan romanon Patrick Chevalier, dum apude Renée Triolle prezentis siajn lernolibrojn kaj la librojn en Esperanto (en kies traduko al la franca ŝi kunlaboris) aŭ francajn librojn en kies traduko al Esperanto ŝi kontribuis. Plia okazo informi pri Esperanto plej diversajn homojn (ne riĉiĝi pro vendo!). Samtipa forumo okazos la 23an-24an de septembro.

En la n° 133 de nia gazeto, Renée Triolle proponis prezentadon de la novaj homoj, kiuj eklernas Esperanton. Post intervjuo de Christophe Roux el Marsejlo, jen tiu de Benjamin, nova lernanto el La Ciotat.

Bonvolu unue prezenti vin, kiu, kio vi estas ?

Mi nomiĝas Benjamin, mi aĝas tridek kvar jarojn. Mi estas aŭtoro-verkisto pri la temo de esoterismo kaj nov-paganismo.

Ĉu viaj libroj jam aperis?

Miaj libroj jam aperis, jes, mi havas kvar librojn publikigitajn kaj tri kiuj ne plu estas publikigitaj.

Mi skribas "manlibrojn" aŭ mi parolas pri la historio kaj la praktiko de antikva greka religio, praktikado nuntempa, kaj la praktiko de "hoodoo", la popola magio de Luiziano.

Kiel vi venis al Esperanto?

Mia patro parolis esperanton, li konsilis al mi lerni ĝin. Li diris al mi, ke

Esperanto estas la lingvo de la spiritismo en Sud-Ameriko. Sed mi ne havis tempon por tio. Li mortis pro kancero, kaj post lia morto mi bezonis sekvi lian iaman konsilon. Mi prenis tempon por tio kaj mi komencis la lecionojn lastoktobre. Mi amas Esperanton pro la lingvo, la kulturo kaj la popoloj.

Vi jam kandidatis en diversaj televidludoj. Rakontu pri tio.

Mi kandidatis por la televidludo: "Tout le monde veut prendre sa place" en oktobro 2022.

Mi ne gajnis.



Post oktobro, mi vidis la televidludon: "Chacun son Tour", en kiu mi deziris partopreni, ĉar la ludo estas pli amuza. Mi kandidatiĝis kaj mi estis elektita.

Kiuj ludoj plaĉas al vi? Kial?

Kutime, al mi ne plaĉas la televidludoj. Mi preferas kartludojn kaj rolludojn.

Ĉu vi jam gajnis?

Ne en "Tout le monde veut prendre sa place" sed mi esperas, ke mi gajnos en "Chacun son Tour".

ndlr: Por ekscii, ĉu gajnis aŭ ne Benjamin, eblas revidi la elsendojn sur France 2 je ĉi tiu [adreso](#)... kondiĉe ke vi unue kreu konton.



Vojaĝemaj federacianoj...

4-a Verda Naturisma Semajno

Thierry Spanjaard

Ĉi tiu evento, kunorganizita de INOE kaj de la Esperanto-Kulturdomo Greziljono, okazis de la 3-a ĝis la 7-a de julio, Ĝia ĉi-jara temo estis «Esperanto-parolantaro».



*kelkaj geamikoj niaj en la grupo...
ĉu ilin vi rekonas?*

En la programo estis proponitaj kursoj por komencanta kaj progresanta niveloj, kiuj ricevis plenan aprobon de la partoprenantoj.

Kio allogis la ludresponusulojn, kiuj elektis vin?

Ili diris, ke mi estas natura, ke mi ne ludas rolon, ke mi estos bona kunludanto. Do ili elektis min.

Ĉu vi jam konas la datojn, kiam vi aperos surekrane?

Jes. Mi eniros la ludon la 11-an de aŭgusto, poste mi aperos surekrane kaj mi ludos la 18-an, 30-an, 31-an de aŭgusto, kaj ankaŭ la 2-an, 11-an kaj 14-an de septembro, sur kanalo 2..

Multaj aliaj programeroj allogis la ĉeestantojn:

- promenado en la parko por malkovri la lokajn flaŭron kaj faŭnon
- ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo: vizito de Cornillé-les-Caves, vilaĝo situanta super kelreto
- vizito de la loka naturismejo Nat-Anjou
- ludoj, sportoj, ktp.
- koncertoj, kantoj: Ĝeromo, unu el la partoprenantoj, bonege koncertis, kante, gitar-kaj mandolin-ludante.
- prelegoj pri la kastelo Greziljono, pri INOE kaj pri nombrosistemoj...
- libroservo

Resume: tre sukcesplena semajno, en kiu partoprenis pluraj Provencanoj, membroj de nia Federacio.

Découverte de l'astronomie à Kvinpetalo

Patrick Lagrange

Un stage de découverte de l'astronomie s'est déroulé du 28 août au 1er septembre 2023 au centre d'espéranto « Kvinpetalo » à Bouresse.

Le temps de travail se déroulait le matin de 10h à 12h et de 16h à 18h. Des thèmes très divers ont été abordés à la demande des participants : la naissance de la science Astronomie, la Terre, la Lune, le système Terre-Lune, le Système Solaire, le Soleil, la grande famille des étoiles, toutes les catégories des astres, les structures de l'Univers et la conquête spatiale.

Les 8 participants ont été ravis de découvrir que l'astronomie peut être comprise en des termes simples en se basant sur des notions de physique élémentaire.



Patrick prelegas pri sia fako.

Il avait été prévu des séances d'observation aux instruments le soir de 22h à 23h30 et le matin de 5h30 à 7h00.

À cause d'une météo très défavorable, seules 4 séances ont pu être concrétisées.

Une conférence publique d'astronomie a été proposée le 30 au soir et la météo a permis les observations de la Lune et de Saturne. Une cinquantaine de personnes en ont profité.

70-a datreveno de la kreaĵo de la Internacia Naturista Federacio

Partoprenis en ĉi tiu evento la Internacia Naturista Organizo Esperantista, INOE (kaj ties prezidanto Thierry Spanjaard).



Ĝi okazis de la 7-a ĝis la 10-a de septembro en «Centre Helio-Marin - Montalivet» kaj kunigis reprezentantojn de dudek naciaj federacioj kaj INOE.

Ĝi estis belege organizita de INF-FNI, «International Naturist Federation», kun la subteno de FFN, «Fédération Française de Naturisme» kaj de lokaj organizoj, CSBCA (Club du soleil Bordeaux Côte d'Argent) kaj MiPyNu (Midi Pyrénées Nu).

Pasporta Servo viglas!

Thierry Spanjaard

Oni kelkfoje legas, ke Pasporta Servo ne funkcias tiel bone ol ni esperas... Tamen, eĉ se mi ne estis longe en Marsejlo lastsomere, mi akceptis vizitantojn pere de ĝi.

Fine de aŭgusto vizitis min **Tymoteusz** kaj **Lukasz**.

Ili estas polaj studentoj, kiuj vizitis nur Parizon kaj Marsejlon en Francio.

Tymoteusz bone regas nian internacian lingvon kaj Lukasz aktive lernas, kio ebligis tute interesajn konversaciojn. Ili tute ŝatis la restadon, vizitis la urbon kaj mi proponis al ili profiti de la varma marakvo por viziti naturistajn plaĝojn en Marsejlo kaj en la «Parc national des calanques». Ili ĝuis la Marsejlan etoson, tute malsaman ol tiu en Krakovo!



Tymoteusz kaj Lukasz



Joanne

Meze de septembro, venis **Joanne**. Kiam ŝi kontaktis min, ŝi klarigis ke Marsejlo estas nur halto inter flugoj de Tenerife kaj al Florenco. Ŝi diris, ke Marsejlo aspektas tute danĝere, kaj pro tio petis tranoktadon ĉe mi. Bonŝance, ŝi venis jaŭde, do povis partopreni en la ĉiusemajna konversacia rondo de Espéranto-Marseille. Poste ni piediris sur strato Canebière kaj la Malnova Haveno. Mi faris tiom da rekomendoj al ŝi pri sekureco, ke post sia vizito ŝi opinias, ke Marsejlo estas eĉ pli danĝera, kvankam kompreneble nenio okazis.

Post nia partopreno en la UK en Torino (*ndlr: en la sekvaj paĝoj, vi trovos plurajn priajn raportojn*), **Fabio Santos**, kiu agas en nia movado kiel estrarano por la Brazila Esperanto Ligo, kun sia edzino **Myrejla** profitis la okazon por vojaĝi en Italio kaj en Francio, kie mi, dank' al Pasporta Servo, ilin gastigis kaj ĉiĉeronis tra la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj de Aix-en-Provence. Ili ekzemple vizitis la Zamenhofan memoraĵon kaj la kastelon La Coste, kie ili interalie povis admiri brazilajn artaĵojn, t.e skulptaĵojn de la mondkonata «Tunga» kaj la tutlastan verkon de la arkitekto Oscar Niemeyer (kiu ankaŭ konstruis la urbon Braziljo).



Philippe malkovrigis al Myrejla kaj Fabio la tri ZEOjn de Aix-en-Provence: strata nomplato (Rue des Espérantistes), bushalteja nomplato kaj granita slado. (revidu prie la numeron 103 de nia gazeto)



Fabio kaj Myrejla en la parko de Kastelo La Coste, apud skulptaĵo de Tunga "Psicopompos"



Pour en savoir plus sur l'artiste brésilien Tunga, vous pouvez consulter cette page de l'encyclopédie Wikipédia :

[*https://fr.wikipedia.org/wiki/Tunga_\(artiste\)*](https://fr.wikipedia.org/wiki/Tunga_(artiste))

et si vous ne savez pas ce que sont les psychopommes, il y a aussi cette page :

[*https://fr.wikipedia.org/wiki/Psychopompe*](https://fr.wikipedia.org/wiki/Psychopompe)

108-a Universala Kongreso de UEA en Torino

ndlr: Kiel mi jam skribis en la unuapaĝa Vorto de la redaktoro, mi surprize kaj ĝoje ricevis plurajn longajn kaj detalajn raportojn kaj multajn fotojn pri la Torina UK. Dankon al ĉiuj kontribuintoj, kiuj tiel pliriĉigis la enhavon de ĉi tiu numero 134 de nia gazeto. Mi elektis aperigi ĉiujn tekstojn, eĉ se foje enestas neeviteble samaj diraĵoj, sed vi konstatos, ke la diversaj raportoj ofte pritraktas malsamajn aspektojn de la kongreso.



Provencanoj kaŝas sin en la grupa foto... ĉu vi trovis ilin?

Renée Triolle

De post la UK en Montrealo, la organizo de Universalaj Kongresoj de UEA ŝuldiĝas al kongresa fako (komprenu: kelkaj informadikistoj), tiel, ke la lastminutaj ŝanĝoj aŭ aldonaĵoj estis alireblaj nur se vi klakis la apon; se ne, draste mankis en Torino tabuloj kun paperoj, interalie la rendevua tabulo kun centoj da diverskoloraj paperetoj! Feliĉe en Italio, la prezidanto de la LKK, Michela Lipari, kiel mi, partoprenis dekojn da UK kaj bone orient-

iĝis por glata kongreso, kiu plaĉos al ĉiuj.

La kongresejo: tre moderna teknika universitato, sen skribaĵoj sur la tabloj aŭ la muroj de la necesejoj, sed kun la lastaj teknikaĵoj, por projekcii bildojn kaj samtempe rilati kun publiko ie en la mondo, kiu tamen povis fari demandojn aŭ interveni. En ĝi situis teatro, tiel ke ĉiutage pluraj spektakloj (koncertoj, teatraĵoj) proponis kulturalan aspekton de Esperanto al tiuj, kiuj ne fanatikas pri prelegoj aŭ

laborkunsidoj kaj donis ŝancon al novaj talentuloj! Ĝi situas en trankvila kvartalo, kun belaj arboprotektitaj perspektivoj; hoteloj kaj komunaj loĝejoj estis, piede (aŭ trame) atingeblaj. Eblis aĉeti talonojn por manĝi en la studenta restoracio je favoraj prezoj. Se ne, en la kongresejo mem estis kafejo, kaj surstrate kioskoj. Ankaŭ la teatro, kie okazis la malfermo, fermo, kaj vesperaj spektakloj estis piede atingebla en la universitato.

La kongresanoj: kelkaj 1700 homoj el 62 landoj; invititaj estis deko da Afrikanoj, kiuj organizos la UK-on en Tanzanio venontjare. La nombro de francoj superis la nombron de italoj. Verŝajne dudeko da provencanoj.

Mi konfesas, ke mi konatiĝis kun multaj, escepte ĉe la matenmanĝo en la hotelo, kie grupo da Koreinoj ĉefe ekskursis tra tuta Italio, aŭ ĉe restoracietoj. Tiaj estas la homoj: iuj ĉefe ĝuas turisman aranĝon, aliaj seninterompe ĉeestas laborkunsidojn aŭ prelegojn. Estis vera festivalo de T-ĉemizoj en rilato kun Esperanto, ni estas for de la Lapenna-periodo, kiu deziris, ke la viroj surhavu kostumon kaj kravaton por doni prestiĝon al la lingvo!

La programo: Universalaj Kongresoj de UEA estas nekompareblaj kun aliaj Esperanto-aranĝoj pro la nombro de partoprenantoj, la riĉeco de la programo kaj la bunteco de la ĉeestantoj. Kuniĝis en unu loko diversaj asocioj, ĉiuj havis sian spac-



*Se vi ne trovis la provencanojn sur la grupa foto, jen ili...
Sed... mankas kelkaj! Eble videblaj sur la sekva paĝo?*

inter ili prelegis Monique Arnaud pri «La Fontaine», Renée Triolle pri «Paroli france en Francio» kaj «Fratoj Lumière», kaj Thierry Spanjaard pri «Metromapoj, esplora universalo!»

con por sin prezenti, varbi novajn membrojn, prezenti sian agadon: ne nur dum la Movada Foiro (estis tiom da asocioj, ke necesis dividi tablon kun 2-3 aliaj; ni prezentis afiŝon de la venonta MES), sed



Ha, jen ili! Sed kial do vi ne povis grupiĝi sur komuna grupfoto, por ke la enpaĝiganto disponu pri pli da libera loko!

instruistoj (kun tuta Tago de Lernado), junuloj (kun «TEJO sinprezentas), kaj akcepto de Honoraj Membroj, naturistoj, ateistoj (kun elstara prelego de Luigi Garlaschelli, kemiisto, kiu mem rekreis la mortotukon de Torino) aŭ aliaj religiaj asocioj, IKEL (Internacia Komitato por Etnaj liberecoj) ktp.

Kiel kutime, pluraj kunvenoj rilatis al la kongresa temo «Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj»: lerte ĝin gvidis Thomas Bormann kun diversaj demandoj, spertoj de esperantistoj kiel migrantoj aŭ helpantoj.

Ĉar ni estis en Italio, same plej diversaj prelegoj prezentis la gastlandon (Etruskoj, opero, Dante, lingvo-arlekeno) kun rapida kurso pri la itala (por elturniĝi, ne uzante la anglan!).



eĉ Mari-Roza, ĉi tie kun Maggy Combot, iel ĉeestis la kongreson...

Aperis ĝustatempe la libro de la Internacia Kongresa Universitato, tiel, ke mi aĉetis ĝin kaj ne ĉeestis la prelegojn.

Pluiris tradicia Esperantologia Konferenco (sed la materialo, laŭ mi, estas perdita ĉar ne eldonita). Kiel dirite, ne malofte samtempis ĝis 9 kunvenoj, malfacilis elekti inter ĉiuj, despli, ke ĉiuj salonoj estis same komfortaj kun bone reguligita klimatizo!

Honoraj membroj iĝis Renato Corsetti, Anna Lowenstein kaj Katalin Kováts : ilin tri ni akceptis en Provenco por prelegvojaĝo aŭ kurso.

La venonta UK en Tanzanio estos tute alia: oni alvokis al amasa venigo de amikoj, parencoj por turismumi, (do antaŭvideblas kongreso de krokodiloj). Se la lando estas alloga, mankas financa plano: sekve oni alvokis al solidareco; kiu povos, pagos por Afrikano(j) (vojaĝo de Senegalo al Tanzanio kostas 5-monatan salajron...). Pripensu, kion aranĝi por kolekti ĉielan monon. En Torino, la libroservo ricevis donace multajn librojn "por Afrikanoj".

La 108-a Universala Kongreso okazis en Torino, Italio, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023. Ĝi estis bonega oportuneo interrenkonti kun diversaj homoj, interŝanĝi pri niaj diversaj aktivajoj en diversaj kampoj kaj landoj, ktp.

Torino estis mia 6-a Universala Kongreso. La sama magio okazas ĉiufoje! Oni pasigas tutan semajnon parolante Esperanton kun esperantistoj en Esperanta etoso!

La kongresoj ankaŭ estas oportuneoj renkonti amikojn kun kiuj oni antaŭe interagis rete aŭ en reala vivo. Kelkaj estis renkontitaj en Esperantaj eventoj, aliaj gastigis min aŭ estis gastigitaj de mi per Pasporta Servo, ktp.

Kompreneble, oni ankaŭ ĝojas renkonti konatulojn: francoj estis la plej multnombraj inter la diversaj naciecoj partoprenantaj en la UK, kaj inter la francoj, Provencanoj bone reprezentis sian regionon; ĉeestis eĉ kelkaj homoj, kiujn oni ne ofte vidas en Provenco mem. Kelkaj aliaj Provencanoj grave mankis en Torino.

Krom miaj agadoj por INOE – Internacia Naturista Organizo Esperantista – kiuj inkluzivis la Movadan Foiron, la Ĝeneralan Kunsidon kaj tuttagan ekskurson al naturista centro apud Torino, mi ankaŭ prelegis pri unu el miaj

plej ŝatataj temoj: la metromapoj. Tiu prelego allogis multajn partoprenantojn.



Kiel legantoj de tiu ĉi bulteno jam scias, mi ankaŭ zorgas pri la JuTuba kanalo EsKu – Esperanta Kulturo. Do mi kaptis la oportunecon de la UK por intervui verkistojn, esploristojn, nunajn kaj antaŭajn estraranojn de UEA, ktp. Vi povos trovi plian informon kaj spekti la filmetojn ĉe <https://www.youtube.com/@EskuEsperantoKulturo>

Finfine, kiam oni aldonas ĉiujn devigatajn tempojn, mi ne plu havis multan liberan tempon por plene ĝui la prelegojn aŭ la kulturan programon, kiu inkluzivis teatraĵojn, koncertojn kaj aliajn spektaklojn. Tamen mi ege ĝuis la etoson de la kongreso kaj ĉiam konservis sufiĉan tempon por babili kun homoj venintaj el plej diversaj lokoj.

Monique Arnaud

La U.K 2023 okazis en Torino, je 200 km de mia domo: mirinde, ĉu ne?

Mi planis partopreni kaj aŭdacis proponi eron por prezenti dum la Tago de Lernado. Danke al la helpo de Greta Franclet kaj de Virginie Kremp, mi elektis la temon "Jean de La Fontaine kaj aliro al lingvoj." Por la teknika parto mirinde bele helpis min Claire Mousset, nuntempe najbarino.

Mia prezentado okazis je la 14-a, kaj vi povas imagi, ke kongresanoj tiam fintagmanĝis, siestis aŭ elektis la koncerton de "Kajto". Mi dankas al kelkaj Provencanoj, kiuj kuraĝis ĉeesti !

Philippe Combot

Rob Moerbeek

La 30-an de julio, je la 8-a en la mateno, Rob atingis la centran stacidomon en Amsterdamo kaj energie, rapidpaŝe iris al la trajno Thalys, surportante sian dorsosakon kaj tenante sian ne tro pezan valizeton.



"la malstreĉita vendistineto" kiel nomis sin mem Monika

Tamen mi opinias, ke tio estis bona sperto kaj se vi ŝatas la fabliston Jean de La Fontaine, turnu vin al mi: ni kune vizitos lian naskiĝdomon, spektos filmeton kaj vi aŭdos 30 lingvojn, inter ili Esperanton!

Rob estas maljuna esperantisto, nun 87-jaraĝa, sed li restas vigla viro kaj kuraĝa, kiu imagis neniun obstaklon al sia deziro partopreni la Universalan Kongreson en Torino, kaj poste la kongreson de ILEI en Lignano Sabbiadoro, por kiu li preparis prelegon. Li estas elegante vestita laŭ la tradicia eŭropa kostumo, kiun oni ne plu tiel ofte vidas inter esperantistoj. Li ne forgesis, forlasante sian domon, alkroĉi sur sian jakon la tradician verdan stelon, kiun oni ankaŭ ne plu tiel ofte vidas...

Li do enpaŝis en ĉi tiun trajnon al Parizo. Li rapide lasis sian valizeton sur la specialan breton en la vagono kaj iris sidiĝi je sia seĝo. Kaj li lasis la trajnon lin glite porti ĝis la Gare du Nord.

Tie, post kiam la veturilo tute senmoviĝis, li ekstaris, remetis la dorso-sakon sur sian dorson kaj elirante reprenis sian valizeton.

Mi ne scias, kiel li atingis la postan stacidomon, Gare de Lyon: ĉu per takso, ĉu per metroo, ĉu alie?

En tiu dua stacidomo li same entrainiĝis kaj senprobleme alvenis, post iom longa vojaĝo, en la stacidomon en la centro de Torino.

Tie, iom laca sed feliĉa, li iris al la rezervita hotelo. Sed en sia ĉambro li ricevis neatenditan ŝokon!

Tion li rakontis al mi poste en la spektaklo de la kongresejo. Mi vidis lin eniri en la duonluman ĉambregon, iom proaĝe kurbigita, ŝajne fragila, sed ĉiam energia kaj sentima. Li ekvidis apud min, salutis kaj komencis ekscitite rakonti.

Jean-François Cousineau

Torina UK propraokule (kaj orele!)

Ĉi-jare okazis la 108-a UK de Esperanto en Torino (Italio). 1319 homoj el 69 landoj partoprenis. Dudeko da Provencanoj ĉeestis.

La kongresejo situis en la politeknika universitato de Torino kaj la komuna manĝejo kaj Salono Zamenhof nur kelkajn minutojn for piede. Krome trajnoj, busoj kaj metroo ebligis rapide atingi la urbocentron, ankaŭ alireblan piede (30/40 minutoj).

Li malfermis sian valizon en sia dormoĉambro en la hotelo.

Skorzoneron! Ne lia valizo ĝi estas!

Evidente estas la valizo de virino, de malfeliĉa nekonata virino. Roboj, jupoj, mamzonoj, eĉ striptiza kalsoneto! Jes, li tiel ekzakte vortigis la afereton! Kaj Rob estis sincere malgaja. Lian aflikton tute ne kaŭzis la perdo de liaj propraj vestoj kaj diversaj tualetiloj, kiujn li listigis al mi, sed la fakto, ke li viktimitigis tiun nekonatan virinon, kies valizeton li senintence forprenis.

Rob Moerbeek estas admirinda pro siaj bonkoreco, kuraĝo, sprito kaj kompetenta sindediĉo al la esperanta movado.

Vi povas legi pri lia agado en tiu artikolo de Vikipedio:

https://eo.m.wikipedia.org/wiki/Rob_Moerbeek

Ĉar temis pri mia 9-a UK-partopreno, mi ĉi-foje decidis iom flankenmeti la kulturajn nemuzikajn erojn profite al liberaj hazardaj interkonatiĝoj (matene) kaj al artaj - ĉefe koncertaj - eventoj (posttagmeze) por plifortigi miajn primuzikajn konojn kaj rilatojn kun la muzikistoj.

Tiurilate la semajno estis tre sukcesa.

La unuan tagon mi partoprenis la Movadan Foiron, afable gastigita ĉe la budo de Espéranto-France, propagandcele por la venonta Mediteranea Esperanto-Semajno.



Jeff dum la Movada Foiro

Dum la sekvantaj tagoj la informaliĝiloj estis regule elprenitaj de sur la elmontra tablo en la akceptejo. Mi ankaŭ profitis la oportunon por diskonigi la revuon *Espéranto-info*. Pluraj homoj pretis aboni, sed nur bitan version (pro mon- kaj ekologi-kialoj). Onta pripensinda afero...

Pri la Solena Inaŭguro, mi bedaŭris, ke ne plu okazis la unuopaj prezentiĝoj laŭlandaj. Ilin oni anstataŭis per laŭkontinenta prezentado, bedaŭrinde sen precizo de la nomoj de la ĉeestantaj landoj... (por laŭdire mallongigi la aferon... sed laŭ mi preferindus anstataŭe mallongigi kelkajn estraranajn paroladojn...).

Efektive, kial rifuzi al la ununura reprezentanto de iu lando sinprezentanta nome de sia lando antaŭ centoj aŭ eĉ miloj da tutmondaj samideanoj la efemeran fierecon tiam sentitan? Mi tiurilate aparte pensas pri la anoj ĉi-jare venintaj el foraj landoj kiel Angolo, Barato, Benino, Centr-

Afriko, Dominika Respubliko, Gvatemalo, Islando, Malto, Nov-Zelando, Senegalo, Tajvano kaj Togo-lando... Tamen bona ideo estas starigi laŭvice en la salono ĉiujn partoprenantojn el la plej multĉeestant-havaj landoj (1-a Francio (kun 182 homoj)), 2-a Italio (117) 3-a Germanio (94) laŭ la Kongresa Libro – fakte pli). Sed ĉu tia nura prezentado estus justa por la landoj malmultnombro reprezentitaj, kiuj anstataŭe prefere estu reliefigitaj?

Pri tiuj bedaŭrindaj ŝanĝigoj, mi ankaŭ miris, ke ne plu aperas la retadreso de la partoprenantoj en la Kongresa Libro kaj ke ankaŭ ne aperis sur la ĉiutaga informilo (*La Taŭra Voĉo*) la nomoj de la novaj alvenintoj (en la Kongresa Libro aperas nur 1198 nomoj el 62 landoj kaj dum la Solena Fermo esti anoncigitaj 1319 homoj el 69 landoj: eble estis konatuloj inter ili, sed kiel scii?...). Krome la surŝilda kongresnumero estis unuafoje presita tiel malgrande, ke tute ne eblis legi ĝin... Prie nova stranga ekaperinta kutimo konsistas en presi sur ĝin nur antaŭnomon aŭ kromnomon, kio fakte ne faciligas identigi tiun, kiu fakte staras antaŭ vi...

Plia nova malapero ĉagrenis min! Tiu de la tradicia *Rendevua Tabulo*. Efektive ĝia forigo malhelpis min renkontiĝi kun almenaŭ kvar homoj... kio neniam okazis al mi dum la antaŭaj partoprenitaj UK-oj tamen multe pli homhavaj. Efektive retadreso kaj telefonnumeroj ne ĉiam aperas en la Kongresa Libro, kaj krome ne ĉiuj telefon-

posedantoj regule kontrolas siajn mesaĝojn...

Granda manko do por mi, kio konfirmas al mi la iompostioman malhumaniĝon de la movado, tiel spekulanta la nunan socian tendencon forpuŝi la aŭtentajn fizikajn interhomajn rilatojn profite al la virtualaj. Tio jam ekis per la forigo de la papera versio de la Jarlibro de UEA... Kial do tiel rapide forigi tiujn tamen plu esencajn fundamentajn kaj tradiciajn helpilojn, kiam neniu nepre neceso tion postulas? Ĉu por aspekti modernece aŭ tut-simple por ŝpari kelkajn eŭrojn? Kie plu kuŝas la interna ideo de Esperanto faciligi senperajn interhomajn rilatojn? Ĉu baldaŭ UK-oj okazos nur virtuale?...

Nu, sufiĉas miaj plendoj kaj bedaŭroj! Ek nun al la ceteraj multnombraj pozitivaj punktoj de tiu ĉi Universala Kongreso!

La Nacia Vespere estis centrita sur la simbola itala figuro Dante, kaj muzike partoprenis la **Birda Flut-Triopo**, kiu prezentis barokajn kaj nuntempajn flutmuzikaĵojn, kaj la italino **Grazia Barboni**, kiu interpretis diversstilajn kanzonojn kun gitara akompano.

Agrabla italeca etoso...

La kongresaj bankedo kaj balo okazis la lundon vespere en la ĝardeno de la

Palazzo Reale (Reĝa palaco). La unuan parton de la balo vigle kaj efike prizorgis en tre amikeca festa etoso la triopo **jOmO, Kimo kaj Abel**.

DĴ Linda kaj ŝia tutmonda kantokolekto poste eluzis la lastajn danco-minutojn de la balo.



la
surscena
triopo

Okaze de la vespero, permesatis senpaga enirejo kaj vizito de la grava interesege arkeologia muzeo situanta en la subteretaĝo de la Reĝa palaco: tre bela donaco!

Ĵaŭdon vespere, **Verda Banano** (Saŝa Pilipoviĉ kaj Georgo Handzlik) prezentis sian kabaredan spektaklon «Mi diros al vi sekreton»... Ĝi vekis multan ridadon de la ĉeestantaro dank' al amuzegaj spritaj skeĉoj kaj ĝisabsurdigitaj situacioj ofte aludantaj la Esperanto-movadon... Tre bona vespero, eĉ se la akustikeco de la salono foje ĝenis la tujan bonan komprenon kaj postulis orelstreĉiĝon!

Vendredon vespere alvenis la kulmina atingo - almenaŭ muzike - kun la koncerto de **Kjara**. Kjara (Chiara Raggi) estas itala kantaŭtorino, gitaristo, komponisto kaj kultura entreprenisto. Ŝi eldonis kvar diskojn en la itala antaŭ ol malkovri

Esperanton kaj aperigi sian unuan esperantlingvan KD-on en 2019. Dua aperis antaŭ unu monato en julio. Notindas, ke ŝi gajnis la Eurovision Song Contest pri minoritataj lingvoj en 2022 kun 78% da favoraj voĉdonoj!... Kvankam ŝi vekigis la matenon kun grava voĉproblemo pro verŝajna angino, ŝi absolute rifuzis nuligi sian koncerton, «ĉar mi atendis tiun momenton de tiom longe», ŝi klarigis. Ŝi efektive plenumis veran heroaĵon sursceneje kaj altnivelan profesionan spektaklon! Grandan momenton ni travivis! Dankegon, **Kjara!**



Pri la artaj eventoj, mi aparte ĝuis la koncertojn de **Kimo** (eks-Amplifikiano) kun sia akordiono, de la du bardoj - **Mikaelo Bronŝtejn** (kun barbo) kaj **Georgo Handzlik** (sen barbo), de la rok-danciga **jOmO**, de la trubadura paro emociveka **Ĵomart kaj Nataŝa**, de la vigla tradicia kaj popfolka Frisland-devena **Kajto (Nanne kaj Ankie)**, kiu kiel kutime kunkantigis kanone la publikon (ili profitis la okazon por premiere vendi sian plej lastan kompaktdiskon...), de la itala stelulino **Kjara**,

kiu proponis kun **Mario Migliucci** altkvalitan recitalon ĉirkaŭ la vivo de Zamenhof, kaj fine de iu promesplena novulo angolodevena **Abel Massiala** kun sia trankviliga afrikeca kantaro nur pergitare akompanita. Libera postkoncerta aliro sursceneja ebligis al mi tre plaĉajn renkontojn kun la artistoj. Mi bedaŭrinde maltrafis la dimanĉposttagmezan koncerton de Grazia Barboni, kaj sekve ne povas komenti prie.



de supre malsupren: Kimo, jOmO, Handzlik kaj Bronŝtejn, Ĵomart kaj Nataŝa



*de supre malsupren:
Ankie kaj Nanne,
Kjara kaj Mario Migliucci,
Abel Massalia*

Dum la eklektika Internacia Arta Vespero artis homoj el Sud-Koreio, Barato, Brazilo, Japanio, Danio, Italio, diverslandoj afrikaj, Indonezio, Nederlando, Uzbekio, Tanzanio, Orienta Timoro, Ukrainio... kaj la tradicia Internacia Ĥoro (komuna kantistaro reprezentanta plurajn dekojn da landoj).

Ekstere, post la Solena Fermo, dum kiu la ambasadoro de Tanzanio solen- ege vantadis la ecojn de sia lando en senfina dormiga parolado... ĵus antaŭ la tradicia simbola transdono de la

verda standardo al la reprezentanto de la venonta UK-gastiglando Tanzanio (la unua UK okazonta en Afriko), la partopren- antaro estis emociplene akompanata per senfina vigla sed kortuŝa «Ĝis la revido» kantita de Nanne kaj Ankie (Kajto) ĝis la fina komuna disiĝo...

Ha, gravan rezulton mi forgesintus: la kutiman piedpilkan matĉon, kiu oponis la esperantistan teamon al la enmigranta perua, gajnis la esperantista (3-0)!

Krom la kelkaj neeviteblaj misoj en tia tiom amplekse organizita aranĝo, mi taksas tiun UK-on sukcesa, dank' al ĝia aparta internacieca etoso paca (ĉu UK ne estas tia nekutima ejo, kie dum milita tempo eblas vidi rusojn kaj ukrainojn kune kaj pace diskuti kaj ŝerci en familia etoso?), dank' al la multaj interesaj ren- kontiĝeblecoj, kaj ankaŭ dank' al la afa- bleco kaj sindonemeco, kiujn la LKK-anoj montris dum la tuta semajna renkontiĝo. Ili estu ĉi tie refoje ege dankitaj pro tio kaj pro la granda laboro plenumita! Kaj nun, ni rendevuu venontjare en Aruŝo (Tanzanio)!



PS: Mi forgesis skribi ion pri Torino, al kiu mi tamen sukcese dediĉis iom de mia tempo... Temas pri ja vere belega urbo kuŝanta piede de la Alpaj montaroj kun riĉa heredaĵo. Grandiozaj barokaj placoj kaj nobelaj palacoj, interesege altvaloraj muzeoj inter la plej famaj kaj riĉaj en la mondo (egipta - nepre vizitinda! -, aŭtomobila, kinarta)

Philippe Duc Goninaz

En la 108-a Universala Kongreso en Torino 2023, ni finfine estis 1 319 aliĝintoj el 69 landoj por ĝui diversajn kaj kutimajn agadojn kiel la komuna vespero, prelegoj, kunsidoj, ekskursoj, lingvaj kursoj - ekzamenoj, artaj aranĝoj, bankedo-balo, piedpilka matĉo..... UEA elektis la temon «Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj» kaj konsekvence prenis rezolucion je sep ideoj kies centro estas la homaj rajtoj.

La Urbo Torino estis la unua ĉefurbo de Italio dum kvar jaroj, ĝi estas pli ol dumil jaraĝa. Ĝi enhavas sesdek tri muzeojn kaj multajn religiajn kultejojn, inter ili la Mortotuko.

Ĝi estas la itala urbo plej rica je publikaj verdaj areoj kun tricent dudek kilometroj de arbarigitaj bulvaroj kun multnombraj parkoj kaj fontanoj.

Pro ĝiaj eksterordinaraj riĉaĵoj, mi preferis partopreni urbajn ekskursojn por praktiki la lingvon, babilante kaj interkonatiĝante, ol aŭskulti prele-

kilometroj da arkadoj (tre ŝatataj kontraŭ la suno, despli ke varmveteris dum la kongresa semajno!) kaj agrabla laŭrivera parko, subĉiela bazaro taksita kiel unu el la plej vastaj en Eŭropo...

Jen eta superrigardo al la Piemonta ĉefurbo... Kun Torino, kaj post Romo kaj Florenco, Italio gastigis UK-on en siaj tri historiaj ĉefurboj!



gojn.

Kvarfoje, ni promenis tra la urbo piede, bicikle, centre, ĉirkaŭaĵe aŭ laŭrivero, ĉiam kun itala gvidist(in)o helpata de volontula esperantista tradukisto.

Mi komencis promenadi la unan sabaton kaj pro tio bedaŭride maltrafis nian provecan grupo-foton.

Vi povas vidi kelkajn miajn fotojn de la 13-a kaj 16-a de aŭgusto en la Fejsbuka grupo « ESPERANTO.IT »

Pliaj informoj:

<https://uea.org/gk/1118a1>

<https://www.facebook.com/uktorino2023>

<https://uea.org/kongresoj/uk/2023/>

2-a Interkultura Novelo-Konkurso

Pascal Vilain

Male al pasintjare, kiam mi partoprenis en la Belartaj Konkursoj por la Montreala UK, mi decidis ĉi-foje, por la Torina UK, partopreni en la 2-a INK, Interkultura Novelo-Konkurso, iniciatita de ALE, Akademio Literatura de Esperanto, kunlabore kun Bobelarto, kaj aŭspiciata de UEA. La ĉi-jara temo estis: "Nokta vojaĝo".

Mi do verkis novelon, sendis ĝin al Bobelarto... El 421 konkursantaj noveloj de aŭtoroj el Norda kaj Suda Amerikoj, Eŭropo, Afriko, Azio kaj Aŭstralio, mi surprize gajnis la 4-an premion, en la kategorio "komencantoj", t.e. la kategorio de la ne ankoraŭ publikigitaj aŭtoroj. Jen sube la novelo, kiun mi verkis.



Nepre nun...

Plia halto de la trajno.

Kiom da tempo pasis de post la antaŭa? Ne nur kelkaj minutoj, verŝajne pluraj horoj.

Fakte, mi ne scias.

Lulita de la regula kaj monotona rul-kadenco de la vagonradaro sur la trako, mi donis min delonge en la brakojn de Morfeo.

Se bruaro plej bone simbolas trajn-vojaĝon, nekontesteble por mi estas tiu grinca kunfrotiĝo de la feraj trajn-

radoj kun la ŝtalaj reloj, kaj la tuj re-konebla brueto de radoj, kiuj fojfoje trafas trafikforkon.

Mia trajno haltis.

La bremsoknaro kaj sekva senmoviĝo elsonĝigis min. Jam forsvenis la scenoj kaj bildoj, en kiuj rolis la nun duona dorminto, kiu nevole mi ĵus iĝis. Mi tamen iel memoretas, ke ne vere agrablis lasta inkubsonĝo, ebla kialo de kapdoloreto, kiun mi nun suferas.

Okazis halto.

Kial? Kie ni estas?

Okulumante al la ekstero tra la vagon-

kupea fenestro, mi ekkomprenas: jen, stacio.

Multajn aliajn nia veturilo jam preterpasis; jam ĉe kelkaj ĝi senmoviĝis, ĉe aliaj ĝi plu haltos antaŭ ol atingi mian vojaĝcelon. Pasaĝeroj eltrajniĝu, aliaj eniĝu.

La stacidomo bonŝance staras ne meze de nenie, sed urborande.

Mi ne vere komprenas, kial pli kaj pli estis kaj plu estas konstruitaj novaj stacioj for de urboj. Ili devigas uzadon de navedaj busetoj por transporti vojaĝantojn de granda trajnhaltejo al urbocentro. Plie, ili senigas min, kaj verŝajne ne nur min, je iu plezuro ĉiam spertata. Mi ja ŝategas ĉi tiajn momentojn, okaze de nokta vojaĝo, kiam mi havas la eblon ŝtelobservi vivspurojn en dormhoroj. Impresas ĉefe silento profunda, kvankam ne prema, fojfoje rompita de nuraj surkajaj movoj. Okulfrapas palega lumo, plejofte flavaĉa, kiun disaj stratlampoj ŝvebigas super la tuta pejzaĝo. Mirigas tute speciala etoso, travivebla nur plennokte.

Tie kaj tie plu videblas lampobrieto trakurtena. Homoj do ankoraŭ aktivas je la tria matene.

Ĝus revenis el laborejo...

Jam prepariĝas por nova labortago...

Plu amoras...

Daŭre diskutas...

Ree disputas...

Direktas sian atenton al malsanulo...

Suferas sendormecon...

Forgesis malŝalti lampon...

Jen biciklanto, kaj tie aŭtomobilo. Ekaperas reflektoroj blankaj, forsvenas ruĝaj...

Iu paŝadas: ĉu sendomulo, dormomankanto aŭ noktovagulo?

Plua vivo, sed lanta vivo...

Post kelkaj minutoj ekstartas ree la trajno. La radaro retrovas sian kadencan knaradon. Rapide reendormiĝas miaj samkupeanoj. Mi ne. Ne plu dormema. Ne tuj. Revado anstataŭas sonĝadon. Sed tio ne daŭras. Plene veka kaj konscia, ne tro ĝenata de la ronkado de kelkaj kunvojaĝantoj, mi lasas miajn pensojn vagadi al ŝi. Ŝi, kiun de tiom longe mi ne revidis.

Kial ŝi petis, ke tiun vojaĝon mi nepre faru? Nun!

Mi memoras pri simila nokta trajnvojaĝo antaŭ trideko da jaroj.

Sama fervojo. Samaj deirpunkto en Francujo kaj celstacio en Italujo. La tiama vagono malpli modernis, sed samis la monotonritma radgrincado sur la reloj. Male al hodiaŭ, mi ne solis: akompanis min grupeto da gejunuloj, kun kiuj mi estis pasigonta dusemajnan restadon en feriejo.

Juna franco 15-jara mi tiam estis, kaj nokta trajno kondukis min al Rapallo, mediteraneborde, ĉe la turisma Liguria Riviera, konata ankaŭ kiel Riviera di Levante.

Ambaŭ semajnoj pasis ege agrable!
Kunvivis en la sama restadejo italaj kaj francaj gejunuloj, kiuj celis ne nur amuziĝi sed ankaŭ praktiki alian lingvon ol sian denaskan. Ni ja kune diskutis, tage-nokte, kaj ridis, ludis, sportumis, foje enamiĝis... Adoleskeco estas ja ofte stampita per korinklinoj, ĉu ne?

Mia nokta vojaĝo antaŭeniras plu.
Dum kilometrojn forglutas la trajno, memoraĵojn revivigas mia nedormema cerbo.

Giuliana tuj plaĉis al mi. Allogis min ŝia ĉiama ĉarma rideto, ŝia ina beleco, la neimitebla itala akĉento ŝia, kiam ŝi provis esprimi sin france... Ni kune pasigis agrablegajn momentojn. Mi serĉis ŝian kompanion, ŝi la mian, ni rapide iĝis kvazaŭ nedisigeblaj. Ĉu adoleska enamiĝo? Ne estus troiĝe aserti, ke al tio forte similis nia rilato. Restas al mi fotoj pri tiu somera restado: Giuliana kaj mi plejofte apudas. Tiaj feriaj travivaĵoj tamen havu devigan finon: venis la disiĝa momento. Multon ambaŭ ni promesis: ke mi revenos Italujen, ke ŝi vojaĝos Francujen, ke ni ne forgesos unu la alian, ke ni rilatos letere, foje telefone. Kaj ni ja ade korespondis, tamen sen revido. Alie decidis por ni unue niaj gepatroj, pro aliaj feriprojektoj, alilandaj vojaĝceloj...

Alie decidis ankaŭ viv-cirkonstancoj: jarojn poste ŝi iĝis edzino en sia lando. Mi edzo en la mia. Naskiĝis niaj respektivaj infanoj. Tiel iras la vivo...

Sed neniam ĉesis nia korespondado, akceptita de niaj vivkunuloj.

En la noktaj mallumo kaj silento, regulritme traboras sian vojon mia trajno. Profunde dormas plu miaj samkupeanoj... vagadas plu miaj pensoj.

Kial ŝi petis, ke nepre nun tiun vojaĝon al ŝi mi faru?

Ĉu pro la fakto, ke ambaŭ ni senkunuliĝis? Ĉu ŝi spertis aliajn amaventurojn post sia senedziĝo? Pri tio ŝi diskrete neniam aludis en siaj leteroj. Miaflanke, mi decidis ne plu kateniĝi en amor- aŭ amrilatoj. Tion mi skribis al ŝi, aldonante tamen ke la ligo, kiu kunigas nin, troviĝas super tiaj baznivelaj konsideroj. Ĉu pro tio ŝia insista peto? Nu... verŝajne ne... certe estas io alia.

En lasta letero ŝia, ŝi aludis pri grava malsano, kiu ŝin trafis. «Mi eltenos. Ĉio glat- os... Estus bele, se ni povus finfine revidi unu la alian!»

En lasta telefonalkvoko, ŝi insistis: «Venu kiel eble plej rapide, mi petas!».

Mi ne scias, kion pensi. Konflikto en mi agrabla antaŭĝojo ŝin retrovi kaj timiga antaŭsento ŝin perdi.

Nokta trajno kondukas min al Giuliana...

Nekrologo

Ni eksciis pri la bedaŭrinda forpaso de du samideanoj.

En Draguignan (83), forpasis la 7-an de septembro **Myriam Bourgeois**,
fratino de Marie, mortinta antaŭ kelkaj jaroj.

Ambaŭ fratinoj foje partoprenis la agadojn de la klubo de Fréjus - Saint-Raphaël.



En Avignon (84) forpasis la 20-an de septembro
Jean-Pierre Schneider, 80-jara.

Jean-Pierre multe agis por la asocio "Réinsertion et
espéranto", efike zorgante pri ĝia libroservo.

Li ankaŭ tre aktivis por la Paco.

*fotita la 6-an de marto 2008 en Agay,
okaze de Mediteranea Esperanto-Semajno*

Esperanto-Provence sincere kondolencas iliajn familianojn kaj geamikojn.

Dernière minute...

Inauguration d'un « Arbre de l'espéranto »

quand ? samedi 21 octobre - 11h30

où ? Correns (Var) - en haut de la rue du Cros (face au bar)

où se garer ? à l'entrée du village, devant ou derrière la salle polyvalente, puis venir à pied

déroulement :

- inauguration avec discours officiels (Mairie – Fédération Esperanto-Provence)
- apéritif offert par la commune
- pique-nique tiré du sac à la Roquette, face à la salle polyvalente, de l'autre côté de la rivière (*pour ceux qui étaient déjà venus il y a quelques années, même endroit*)
- en cas de mauvais temps, pique-nique dans la salle des Pénitents Blancs, dans la rue de l'arbre

Nous espérons vous y voir nombreux... qu'on se le dise !



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques "espéranto" :

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)

bar de l'hôtel Ibis-Gare - 45 rue Edith Cavell (face à la gare)

infos : *Pascal Vilain - 06 42 19 68 51*

dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

octobre 21 - Correns (83)

Inauguration d'un Arbre de l'espéranto

infos page précédente

décembre 9 & 10 - La Garde (83) - Domaine de Massacan

Week-end culturel - bulletin d'adhésion joint

2024 mars 9 - 16 - Les Issambres (83)

MES - Semaine méditerranéenne d'espéranto

en France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

à tout endroit du monde

novembre 23 - 26

4e Congrès Virtuel d'espéranto.

Après les éditions 2020, 2021 et 2022, la 4e édition du Congrès Virtuel d'UEA, version électronique du Congrès Universel UK, promet de nouveau un programme riche et diversifié.

infos : <https://eventaservo.org/e/VK4>